# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2018-01-30 n-ro 432


# Eŭropo: Ni ne forgesu : Pli ol 10 000 migrantaj infanoj oficiale malaperis



Israelo : la postvivantoj de la Holokaŭsto suferas pro malriĉeco

Netanyahu: Israelo elpelos kontraŭleĝajn enmigrintojn el sia teritorio

Pintkunveno de AU fokusiĝas pri traktado de sekureco kaj korupto

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Eŭropo: Ni ne forgesu : Pli ol 10 000 migrantaj infanoj oficiale malaperis
*27% el la migrantoj alvenintaj en Eŭropo estas infanoj p. 03*

NETANYAHU: Israelo elpelos kontraŭleĝajn enmigrintojn el sia teritorio
*Proksimume 38 000 afrikaj enmigrintoj p. 03*

Israelo : la postvivantoj de la Holokaŭsto suferas pro malriĉeco
*Preskaŭ 20 000 elsavitoj el la Holokaŭsto vivas en Israelo p. 04*

Pintkunveno de AU fokusiĝas pri traktado de sekureco kaj korupto
*Urĝis afrikajn gvidantojn krei ŝancojn por fini kontraŭleĝan elmigradon p. 05*

Mortis la kreinto de la bildrakonto "*Beetle Bailey*"
*Tiu bildrakonto atingis 200 milionojn da legantoj per 1,8 mil gazetoj tra pli ol 50 landoj p. 05*

Ellaboro de memripariĝanta betono progresas
*Malgrandaj fendoj pligrandiĝas malfermante metalajn elementojn p. 06*

Muziko nur jen kaj jen estas universala lingvo
*Danc- kaj lulkantoj estas kompreneblaj tra ĉiuj kulturoj p. 07*

Johannes HEVELIUS
*Konsiderata fondinto de la luna topografio p. 08*

Hodiaŭe
*Adelbert VON CHAMISSO; Anton Hansen TAMMSAARE; kaj Suneklipso p. 09*

## Eŭropo: Ni ne forgesu : Pli ol 10 000 migrantaj infanoj oficiale malaperis

La eŭropaj ŝtatoj ne garantias la sekurecon de la izolitaj rifuĝintaj infanoj.



En 2016, Eŭropolo konfirmis, ke pli ol 10 000 migrantaj infanoj neakompanataj malaperis en Eŭropo en daŭro de du jaroj. La polica agentejo timis, ke multnombraj el ili estas ekspluatataj, sekse interalie, de la organizita krimularo.

La nombro estis unue malkaŝita en la Interreto fare de la brita semajna revuo *The Observer*, poste konfirmita fare de Eŭropolo: 10 000 migrantaj infanoj neakompanataj malaperis en Eŭropo en daŭro de du jaroj. Post ilia registrado ĉe la eŭropaj aŭtoritatoj, ili malaperas, duono el ili dum ilia trapasado al Italio.

Tiam, Eŭropolo elvokis interalie ellaboritan transeŭropan «kriminalan infrastrukturon», kiu interesiĝas pri la migrantoj en pluraj celoj, interalie sklaveco kaj seksindustrio. En Germanio kaj Hungario, ekzemple, multnombraj krimuloj estis arestitaj pri tie sekspluatado de migrantoj. Jam en 2008, la asocio *Terre des hommes* (Tero de la homoj) menciis, ke duono el la neakompanataj infanoj malaperas el la akceptejo post nur 48 horoj. 27% el la migrantoj alvenintaj en Eŭropo estas infanoj.

Neniam Milito Inter Ni

---

## NETANYAHU: Israelo elpelos kontraŭleĝajn enmigrintojn el sia teritorio

Israela ĉefministro Benjamin NETANYAHU diris dimanĉe [28 jan 2018] en regula kunveno de la kabineto, ke kontraŭleĝaj enmigrintoj en Israelo estos transigitaj al triaj landoj.




NETANYAHU diris, ke en Israelo povas resti nur veraj rifuĝintoj; Israelo ne havas devon permesi al kontraŭleĝaj enmigrintoj resti en la lando, kaj ili estos transigitaj al triaj landoj.

NETANYAHU renkontiĝis kun Ruanda Prezidento Paul KAGAME lastsemajne en la intertempo de la Jarkunveno de la Monda Ekonomia Forumo. Li diris al la lasta, ke laŭ internacia leĝo, Israelo akceptas nur rifuĝintojn sub ŝirmado de la israela registaro.

Donitaĵoj de la Israela Ministerio de Internaj Aferoj montris, ke nun en Israelo estas proksimume 38 000 afrikaj enmigrintoj kaj azil-serĉantoj; kiuj plejparte atingis Israelon en la periodo de 2006 ĝis 2012 kaj loĝas en suda parto de Tel-Avivo.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Israelo : la postvivantoj de la Holokaŭsto suferas pro malriĉeco

Preskaŭ 20 000 elsavitoj el la Holokaŭsto vivas en Israelo. Kvarono el ili vivas sub la sojlo de malriĉeco.



Israelo estas unu el la plej malegalecaj landoj en la mondo: laŭ la Organizaĵo pri Ekonomiaj Kunlaboro kaj Evoluigo (OEKE), 20% el la loĝantaro vivas sub la sojlo de malriĉeco, dum la vivokosto similas okcidentajn landojn. Inter la plej vundeblaj personoj troviĝas la elsavitoj de la Holokaŭsto. 70 jarojn post la liberigo de la koncentrejoj, 189 000 postvivantoj de la Holokaŭsto vivas en Israelo, laŭ la nombroj de la Fondaĵo por la memoro de la Holokaŭsto. Kvarono el ili, t.e 45 000 personoj, vivas sub la sojlo de malriĉeco, fiksita po 3 000 sikloj monate (720 eŭroj), raportas la ĵurnalo Libération. Tiu situacio, kvankam plibonigita danke al monatribuo de 2 200 sikloj (530 eŭroj) monate, fare de la registaro, maltrankviligas la asociojn pri defendo de la viktimoj de la Holokaŭsto.

Tiuj postvivantoj de la Holokaŭsto plejparte forlasis la orientan blokon post la disfalo de USSR, kaj instaliĝis en Israelo, forlasante malantaŭ ili la laborpostenon, ŝparaĵojn kaj pension, eksplikas la ĵurnalo. Le celo de la asocioj, kiuj helpas la viktimojn de la Holokaŭsto estas «informi» kaj «gvidi la postvivantojn en iliaj demarŝoj», subteni ilin, ke ili akiru siajn rajtojn en Israelo. Tion faras la "Asocio por tuja helpo al la postvivantoj de la Holokaŭsto", kiu de 2007, helpas la postvivantojn de la Holokaŭsto, ke ili ricevu la laŭleĝajn monatribuojn. Kelkaj asocioj ankaŭ organizas rifuĝojn por akcepti tiujn maljunulojn, kaj helpas ilin en akiro de medicinaj kaj psikologiaj kuracadoj.

**Monkompensoj**

La NROj luktas ankaŭ por ke la israela ŝtato, kiu ricevis monkompensojn fare de Germanio, repagu ilin al la elsavitoj. Laŭ aŭdito [financa revizio] kondukita en 2008 fare de eks-juĝisto ĉe la Ĉefkortumo, du trionoj el tiuj sumoj ne ankoraŭ estis redistribuitaj.

La 27-an de januaro estas celebrita, kiel ĉiujare, la Internacia tago dediĉita al la memoro de la viktimoj de la Holokaŭsto, kaj prevento de la krimoj kontraŭ la homaro. Tiu dato estis elektita de UN en 2005, kaj koincidas kun la liberigo de la ekstermejo Aŭŝvico, la 27an de januaro 1945.

Neniam Milito Inter Ni

## Pintkunveno de AU fokusiĝas pri traktado de sekureco kaj korupto

Ŝtatestroj kaj registaraj ĉefoj de afrikaj landoj dimanĉe subskrekis traktadon de demandoj pri korupteco, paco kaj sekureco por plibonigi la afrikan estontecon.



Afrikaj gvidantoj faris la alvokon dum la malferma kunveno de sia dutaga kunveno kiel parto de la 30-a Pintkunveno de la Afrika Unio en la ĉefstabejo de la tutafrika organizo en la Etiopa ĉefurbo Adis-Abebo.

Moussa Faki MAHAMAT, prezidanto de la Komisiono de la Afrika Unio, oficiale malfermis la Asembleon de Ŝtataj kaj Registaraj Estroj. Li diris, ke terorismo daŭre ruinigas la regionon *Sahel* kaj la Kornon de Afriko.

MAHAMAT, kiu atentigis pri la danĝera tendenco de elmigrado, urĝis afrikajn gvidantojn krei ŝancojn por fini kontraŭleĝan elmigradon. Li diris, "Ni devas krei perspektivojn por la junuloj, kiuj komencis aventurojn transiri dezertojn kaj oceanojn por serĉi nekapteblan paradizon en la alia flanko de Mediteraneo.

Laŭ MAHAMAT, la situacio en Sud-Sudano, kie la longtempa civila milito influas la sud-sudanan popolon, estas tre grava. Li avertis sud-sudanajn partiojn pri ebla sankcio pro malobservo de interkonsento. Li rimarkigis, ke pli ol 12 000 afrikaj elmigrintoj el Libio estis repatrujigitaj ĵus, kaj alvokis plifortigi klopodojn respondajn al la krizo en Libio.

Ankaŭ paco kaj sekureca situacio en Sud-Sudano, la regiono Sahel kaj la Korno de Afriko estas la ĉefaj celoj de Afriko por la jaro 2018 kune kun la batalo kontraŭ organizita krimularo kaj la klopodo de la AU por silentigo de la pafiloj antaŭ 2020.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

## Mortis la kreinto de la bildrakonto "*Beetle Bailey*"

Laŭ la gazeto "*The Washington Post*", la 27-an de januaro en la urbo *Stamford* (Konektikuto – Usono), en la aĝo 94 jaroj, forpasis hejme pro pulminflamo la bildrakontisto Mort WALKER, kiu estas la kreinto de la bildrakonto "*Beetle Bailey*".



Li desegnadis la ĉiutagan bildrakonton dum 68 jaroj – tio estas faro pli granda ol tiu de iu ajn alia usona bildrakontisto. "*Beetle Bailey*" aperis en la jaro 1950-a, kaj tiu bildrakonto atingis 200 milionojn da legantoj per 1,8 mil gazetoj tra pli ol 50 landoj.

Liaj filoj Brian kaj Greg, kiuj lin helpis ekde la jardeko 1970, daŭrigos la produktadon de la ĉiutaga bildrakonto, laŭ "*The Washington Post*".

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog



# Ellaboro de memripariĝanta betono progresas

Eĉ en tiom ekonomike progresinta lando kiel Usono ekzistas problemoj pri betono - ĝi detruiĝas. Malgrandaj fendoj pligrandiĝas malfermante metalajn elementojn, riparo de kiuj estas longa kaj multekosta. Laŭ informo de la Usona Komunumo de Civilaj Inĝenieroj, ĉi-problemo kostos por la lando preskaŭ 4 trilionojn da dolaroj, se ĝi ne estos solvita ĝis la jaro 2025.

Inĝenieroj jam longe serĉis manieron por memstara restariĝo de betono. Oni pritraktis eblon plenigi la fendojn per polimeraj fibroj, kiuj enhavas gudron. Tamen tiu ĉi multpromesa ideo rezulte estis ne tiom sukcesa. Betono kaj gudro havas diversajn ecojn rilate al temperatura plivastiĝo kaj en kelkaj kazoj la fendoj iĝis eĉ pli grandaj.

Nin Ĉĵan kaj liaj kolegoj trovis alian solvon - fungon *trichoderma reesei*, kiu kapablas kreski en plej malfavoraj kondiĉoj kaj produkti kalcian karbonaton. La esploristoj proponas enmeti sporojn de la fungo en betonon dum ĝia miksado. Kiam fendoj aperas kaj ilin trafas akvo, tiam lanĉiĝas produktado de kalcia karbonato per fungoj kaj tiu karbonato plenigas la fendojn.

Bedaŭrinde estas ankaŭ problemo - la poroj de betono estas malpli grandaj, ol la sporoj de la fungoj, pro tio ili ne pluvivos enmiksiĝinte en betonon. Ĉĵan proponas solvi la problemon per aldono de aerveziketoj en la miksaĵon, sed ĉi-aliro postulas aldonan provadon. Ĉiel, la unuaj rezultoj ŝajnas esti multpromesaj, komunikas *MIT Technology Review*.

Betonaj marpontoj, kiuj estis konstruitaj fare de antikvaj romianoj antaŭ 2 000 jaroj ne nur ne detruiĝis, sed male - iĝis eĉ pli firmaj. Sciencistoj malkovris ilian sekreton. Evidentiĝis, ke maraj mineraloj, eniĝantaj en betonon kun akvo plifirmigas la konstruaĵojn de ene.

Kirill Noviĉenko
Interalie

# Muziko nur jen kaj jen estas universala lingvo

Granda muzika eksperimento montras: Danc- kaj lulkantoj estas kompreneblaj tra ĉiuj kulturoj. Amkantoj aliflanke ne - ili sonas por fremdaj oreloj foje apenaŭ laŭ amo.



Jam frue homoj kantis al siaj infanoj melodiojn por luli ilin al ekdormo. Unu el la unuaj dokumentoj datas el la jaro 2000 a. K. Fortaj ritmoj siavice celis de ĉiam instigi al dancado. Sciencistoj de la usona Harvarda universitato volis scii ĉu kantoj kiuj havas certan celon, havas ankaŭ certajn ecojn pri kiuj la homoj reagas same.

Por eltrovi tion ili kolektis 118 kantojn el 86 diversaj socioj de ĉasistoj-kolektistoj, terkultivistoj kaj aliaj malgrandaj popolgrupoj kaj aŭdigis per interreto sonaĵojn al testpersonoj en la tuta mondo por ke ili prijuĝu la kantojn. En la repertuaro troviĝis apud lul- kaj danckantoj ankaŭ amkantoj kaj kuracaj kantoj. Ĉiu ekzempla sonaĵo estis tiucele aŭdebla dum nur 14 sekundoj.

Por eviti eblajn antaŭjuĝojn la sciencistoj donis al la aŭskultantoj ankaŭ ankoraŭ du kromajn opciojn por respondoj kiuj fakte ne aperis. Tiel ili ankaŭ demandis ĉu la kanto - sur skalo de unu ĝis ses - rakontas ion aŭ ĉu ĝi funebru pri mortintoj.

Kaj vere kelkaj el la entute 750 partoprenantoj falis en la kaptilon kaj konsideris amkantojn prefere kiel muzikajn rakontojn ol kiel amkantojn. Ĝenerale tamen apenaŭ iu povis rekoni amkanton kiel tian por kio la esploristoj havas jenan eksplikon: "Povus esti ke ĉe amkantoj malpli temas pri certa rapideco aŭ kiel kompleksa estas la melodio, sed ke vortoj en tiu kazo estas pli gravaj - kaj tial multaj aŭskultantoj pensis ke temas pri rakonto.

Ke kuracaj kantoj aliflanke ne estas amkantoj, tio estis klara por plej multaj testantoj. Sed ankaŭ en tiu kazo aŭskultantoj havis problemon percepti la sencon de melodio.

Alie estis tio ĉe danckantoj kaj lulkantoj - ilin la testantoj povis tute klare klasifiki. Kial tio estas tiel, tion la sciencistoj ne scias. Sed ili havas siajn teoriojn: "Ĝi montras ke homoj en la tuta mondo estas psikologie tiel similaj ke ĉe certaj ritmoj kaj sonaranĝoj ili volas danci."

La samo validas, laŭ la esploristoj, inverse ankaŭ por dormkantoj. Laŭ tio la aŭskultantoj el Usono, Hindio aŭ Portugalio reagis pri certa stimulo kiu igas bebojn ekdormi. Ankaŭ pri tio estas diversaj teorioj, sed oni ne estas certa pri tio.

Ke homoj reagas precipe al malambiguaj ritmoj kaj melodioj, tion la esploristoj provis montri en dua eksperimento. Ili volis scii ĉu la partoprenantoj prijuĝas la celon de la kanto laŭ la nombro de instrumentoj aŭ ĉu laŭ tio kiom da kantantoj estas aŭdeblaj aŭ kiel estas la rapideco, la melodio aŭ la komplekseco de la kanto.

Ilia resuma prijuĝo estis ke lulkantoj estis perceptataj kiel pli malrapidaj, ilia melodio kaj ilia ritmo kiel malpli kompleksa kaj la takto estis konsiderata malpli konstanta. Rapidaj, ritme kompleksaj kaj stimulaj estis aliflanke atributoj por danckantoj. "Tiuj ambaŭ ĝenroj ŝajnas esti en sia baza strukturo ekzakte spegulecaj."

Estis tamen en la kantoj ankoraŭ io kion la esploristoj ne povis mezuri per siaj demandoj. "Eble la homoj reagas pri la maniero de la prezento aŭ kiel interagas ritmo kaj melodio kaj voĉoj ktp. Tion la esploristoj volas ankoraŭ eltrovi pli precize.

Esperanta Retradio

# Johannes HEVELIUS

La 28-an de januaro estas la datreveno de la naskiĝo (en 1611) kaj samtempe de la morto (en 1687) de la astronomo Jan HEWELIUSZ, germanlingva, laŭ ĉeĥa deveno (lia origina nomo estis Johannes HEVEL aŭ Johann HEWELCKE), konsiderata pola ĉar li naskiĝis en Danzigo/ Gdansko (en la pola *Gdańsk*, en la germana *Danzig*); li estas konata per la latinigita nomo Johannes HEVELIUS (en Esperanto, Johano HEVELIO).



Li interesiĝis precipe pri astronomio (kvankam li ankaŭ plenumis gravajn publikajn oficojn kaj posedis familian fabrikon de altkvalita biero, *Jopenbier*); li kreis en sia domo observatorion, provizitan per fajnaj instrumentoj grandparte elpensitaj kaj konstruitaj de li mem (interalie, teleskopo kun 45-metra fokusa longo, sur 27-metra apogilo, por kies mastrumo estis bezonataj 12 servantoj), kvankam multaj el liaj observoj okazis nudokule (li havis eksterordinaran vidakrecon). La 26-an de septembro 1679 la observatorio, kune kun la instrumentoj kaj la libroj, estis detruitaj de brulego.

Konsiderata fondinto de la luna topografio (li zorgege priskribis la videblan surfacon de la Luno en la mapara volumo *"Selenographia"* – Luna priskribo), HEVELIUS faris observojn pri la sunaj makuloj; pristudis plurajn kometojn; aldonis 11 novajn konstelaciojn al la 48 jam listigitaj de PTOLEMEO en *Almagesto*; ankaŭ desegnis la stelajn mapojn de la aŭstrala duonglobo (surbaze de la observoj de Edmond HALLEY en sia scienca ekspedicio al insulo *Sankta Helena* en 1676); kunmetis katalogon (*"Catalogus Stellarum Fixarum"* – Katalogo de la Fiksaj Steloj) de 1 564 steloj, inter kiuj tiu, en la konstelacio de Baleno, kiun li nomis *"Mira Ceti"* (tio estas, "mirinda de Baleno"), ĉar ĝi kondutas alimaniere ol la aliaj; la katalogo estis eldonita postmorte de lia dua edzino Elżbieta KOOPMAN, kiu estas konsiderata la unua astronomino en la historio (bonŝance por HEVELIUS, la edzino havis liajn samajn interesojn; kiu scias, ĉu alia estus tolerinta hejme 27-metran teleskopon).


HEVELIUS mortis la 28-an de januaro 1687, en la tago de lia 76-a naskiĝa datreveno; li estas entombigita en Gdansko, en la preĝejo de Sankta Katarino.

Du kuriozaĵoj:

– HEVELIUS malkovris, interalie, konstelacion, kiun li nomis *"Scutum Sobiescianum"* (Ŝildo de SOBIESKI) honore al la pola reĝo Jan SOBIESKI III, kiu en la batalo ĉe Vieno (1683) estis venkinta la turkojn, malebligante ilian pluan antaŭeniron en Eŭropo.

- En 2011, okaze de la jaro de HEVELIUS, la Urba Magistrato de Gdansko stampis medalon, por honori eminentajn civitanojn kaj elstarajn gastojn. La 6-an de majo 2012 la medalo estis transdonita al la japana esperantista mecenato ETSUO Miyoshi.

Antonio DE SALVO
Esperanto-vivo



## Adelbert VON CHAMISSO

**Adelbert VON CHAMISSO, aŭ plennome Louis Charles Adélaide DE CHAMISSO DE BONCOURT (naskiĝis la 30-an de januaro 1781 en la kastelo *Boncourt* en Francio, mortis la 21-an de aŭgusto 1838 en Berlino) estis natursciencisto kaj verkisto.**

**En Esperanto aperis: *La mirinda historio de Petro Schlemihl.***

**Vikipedio**

## Anton Hansen TAMMSAARE



**Anton Hansen TAMMSAARE (naskiĝis Anton HANSEN la 30-an de januaro 1878 en la bieno *Tammsaare*, komunumo *Albu*, distrikto *Järvamaa*, Estonio; mortis la 1-an de marto 1940 en Talino, Estonio) estis estona verkisto.**

**En Esperanto aperis: *La korvo kaj la idoj; La mastro de Kõrboja; Knabo kaj papilio.***

**Vikipedio**



## Bildo de la tago

**Suneklipso, 2017.**

**Vikipedio**